

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerc“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsocia).

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Noria, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 190
4. 5. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro
aŭ 0,20 sv. fk. por landoj, kies valuto
sufertis maksimume 50%; por ĉiuj aliaj
landoj 0,06 dol. aŭ 0,25 sv. fk.

Anonprezo

po kvadrat-centimetro egalvaloro de
0,20 sv. fk. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fk.),
en „Internacia Komerc“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

XII-a Germana Esperanto-Kongreso en Plauen (Vogtlando) Pentekoston 1924 (7—10 junio).

Esperanto-ekzamenoj.

Vendredo la 6 junio 1924 en Plauen.

Instigite de gesamideanoj kaj post la konsento de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko la ekzamena komisiono de Plauen decidis, aranĝi antaŭ la XII-a Germana Esperanto-Kongreso ekzamenojn.

Kiel tago oni fiksas vendredon, la 6 junio. Pro jam ofte preparolitaj kaŭzoj oni ne aranĝos la ekzamenojn dum la kongresaj tagoj.

La kostoj por la instruista ekzameno estas M. 10.— kaj por la kapableca ekzameno M. 5.—.

Anoncojn kun vivpriskribado kaj atestoj, eble ankaŭ dezirojn por la prilaborita temo, oni sendu tuj al Prof. D-o J. Penndorf, Plauen (Vogtlando), Sedanstr. 7.

Oka komuniko.

Kotizo. Kiel jam anoncita en nia sepa komuniko, la kotizo estas depost la 1 aprilo M. 4.—, tute egale ĉu germanoj aŭ alilandanoj; samfamilianoj de la anoncintoj (edzinoj kaj infanoj) pagas nur po M. 2.—.

Monsendojn oni direktu al la subskribinto aŭ al Vogtländische Bank, Plauen, kiu havas poŝtekan konton Leipzig n-o 898. Sed oni samtempe informu la bankon, ke la mono estas uzota por la Esperanto-Kongreso.

Senvalidaj aliĝoj estas tiuj, por kiuj ni ne ricevis la kotizaĵon. Tial ankaŭ ni ne sendas la karton, kiu rajtigas preni la kongresaĵojn, se la kotizaĵo ne ankoraŭ estas alveninta ĉe ni.

La kongresaĵoj estos disdonataj nur kontraŭ la kvitanckartoj, kiuj ni sendas al la aliĝintoj post la ricevo de la kotizaĵo. Kiu ne ricevis tian kvitanckarton, anoncu tion al ni.

Donacoj. Oni petis nin, ne plu publiku la ricevitajn donacojn por ŝpari lokon kaj ĉar multaj legantoj ne havas intereson por tio. Ĉetero ni devas bedaŭrinde diri, ke depost publikigo de nia sepa komuniko donacojn ni nur malofte ricevis.

Loĝejo. Denove ni petas tiujn kongresanojn, kiuj ne ankoraŭ precize skribis tion, ke ili sciigu nin plej eble baldaŭ la noktojn, por kiuj ni devas prizorgi litojn. Koncerne la prezojn ni refotoj promesas, ke ni penos atingi plej eble malaltajn prezojn.

Eksterlandanoj. Ankaŭ vi estas kore bonvenaj! Speciale ni atentigas vin je la 10 junio (mardo post Pentekosto), dum kiu okazos en la mondkonata, bonfama banejo Elster en Esperantofesto. Se eĉ estus eble al vi, resti dum kelkaj tagoj en la idilia, arbarriĉa banloko Elster, ni nepre rekomendas tion al vi! Vi povos renkonti tie publikon el la plej diversaj partoj de la mondo — precipe dum la dolĉaj printempaj Pentekostotagoj.

Ekskursoj. Krom la supre menciita ekskurso al la banejo Elster ni aranĝos laŭ deziro post la 10 junio pluaj ekskursoj al aliaj belaj regionoj de la Vogtlando, kiujn ni pro manko da tempo dum la oficialaj kongresotagoj ne povas montri. Ni volonte estas pretaj, doni informojn pri restad-ejoj ktp. al tiuj, kiuj intencas travivi la feriojn en nia belega Vogtlando dum la tempo antaŭ aŭ post Pentekosto.

Fakkunsidoj certe okazos por Asocio de germanaj instruistoj esperantistaj, Esperanto-unuigo de saksaj instruistoj, „Germana Katoliko“, Germana scienca Esperanto-Asocio, Internacia

ligo de esperantistaj poŝtoficistoj. Pluaj fakkunsidoj estas en preparo, sed ne ankoraŭ certigitaj aŭ pro manko de gvidanto aŭ pro ne ankoraŭ sufiĉe da partoprenantoj.

Hermann Scheider,

Plauen (Vogtl.), Morgenbergstr. 4.

Ĉiuj Esperanto-gazetoj estas petataj ankaŭ publikigi tiun-ĉi alvokon.

Postkongresa ekskurso al Budapeŝt.

Laŭ intenco de nia mortinta prezidanto D-o Giesswein ni invitas la vizitantojn de la XVI-a partopreni post la Wien'a kongreso je komuna postkongresa ekskurso al Budapeŝt, ĉe kiu okaze al antaŭanoncantoj ni klopodos havigi loĝejojn, rabatojn kaj gvidantojn. Partoprenantojn do akiru ankaŭ la hungaran vizon kaj ebligu la antaŭzorgojn per anonco de sia veno kaj sendo de 5' svisaj frankoj kiel partoprenkotizaĵo al la „Hungarlanda Esperanto-Societo“. Ni esperas, ke multaj venos por vidi la plej belan urbon de mezeŭropo, apud la Danubo.

Prepara Komitato de la postkongresa ekskurso.

Adreso: cefsekr. D-o Jozefo Takacs! Budapest IV. Váczi u. 8. l. 12. (Laŭ speciala peto komuna aŭ privata loĝejo ankaŭ akirebla.)

Kongreskaravano Berlin—Wien.

1. sciigo.

Kiel en la antaŭa jaro al la XV-a, same en la nuna jaro estas aranĝota kongreskaravano de Berlin al Wien. La taskon prenas sur sin la delegitaro de „Teritorio de UEA Berlin“. La karavano ekveturos el Berlin la 5 aŭgusto per rapidvagonaro trans Dresden-Prag. La tuta vojaĝo daŭros ĉ. 15 horojn.

Estas intencite, elvagoniĝi en Prag kaj resti tie ĝis la proksima mateno. La alveno en Prag okazos la 5 aŭg. je 4 h posttagmeze, la forveturo el Prag-la 6 aŭg. je 7 h matene. Alveno en Wien la saman tagon je 3 h posttagmeze.

Interrompo de la vojaĝo en Dresden ne estas ebla por la karavano, ĉar de tie ni ne plu havus rezervitajn kupeojn. La germana fervojo-direkcio rezervos al ni la kupeojn resp. sidlokojn nur unu fojon, f. e. de el Berlin.

La kotizo por aliĝontoj (germanoj kaj negermanoj) de la karavano estas po 1 germ. ormk. (0,25 USA-dolaro aŭ egalvaloro) inkl. kosto de la por ĉiu rezervota sidloko.

Kiu volas aliĝi, anoncu sin tuj al la subskribinto kaj sendu samtempe la kotizon. Anoncu sen kotizo estas senvalora. Tiuj, kiuj volas veturi kun la karavano nur ĝis Dresden, povas ankaŭ aliĝi, sed ili estas petataj, menciiti tion speciale. La kotizo restas la sama.


Pluaj sciigoj sekvos.

Skribu nepre legeble viajn nomojn kaj adresojn al Max Blankenheim, ĉefdelegito de UEA Teritorio Berlin, Berlin-Steglitz (Germanujo), Stubenrauchplatz 5.

Kongresanoj haltu en Breslau irante al Wien!!!

La Breslaŭaj esperantistoj petas la kongresanojn kiuj prenas la vojon al Wien tra Oderberg halti en Breslau por viziti la vidindan urbon kaj por eventuala publika manifestado.

Oni petas sendi tuj sciigojn pri tago de alveno kaj pri specialaj deziroj al la delegito de UEA Siegmund Freund, Ring 4, Breslau (Germ.)



Elster. Mondkonata, bonfama banloko (idilia, arbarriĉa, saniga), al kiu ĉiujare venas miloj da gastoj el ĉiuj partoj de la mondo.

10. 6. 1924 (pentekostan mardon): Ekskurso de la XII-a Germana Esperanto-Kongreso al tiu belega loko.

Junaj Germanaj Esperantistoj.

Dum la Germana Kongreso en Plauen okazos la 3-a Asocia tago. Nia kunsido estas lundo, la 9 junio je la 9 h. matene.

Tago rdo: 1. Raportoj, 2. elektoj, 3. Diversaĵoj.

Partoprenu mulnombre!

Hornung.

XVI-a Univ. Esperanto-Kongreso Wien.

Invito al Komerca Konferenco

okaze de la XVI-a sub la honora protektorato de la Gremium der Wiener Kaufmannschaft (Gildo de la Wien'a komercistaro) por trakti pri ĉiuj aktualaj demandoj, kiuj koncernas la enkondukon de nia lingvo en la komercistaron kaj la utiligon de Esperanto por la internacia trafiko. Nur tiaj temoj, kiuj estas gravaj kaj valoraj por ĉiuj landoj, povos esti diskutataj. Por ke ni kiel eble plej baldaŭ povu fiksi la definitivan programon, ni petas, ke oni tuj informu nin pri proponoj, intencaj raportoj kaj referatoj.

Por montri la praktikan uzeblecon de Esperanto, ni intencas, se estos eble, aranĝi dum la kongreso

Komercan Ekspozicion,

en kiu diversaj varoj kiuj rilatas al Esperanto, ĉu per vortmarko aŭ signo, ĉu per esperantlingvaj priskriboj, estus ekspoziciotaj. Certe tia apliko de nia lingvo al ĉiuj komercistoj faros bonan impreson. Kapablaj kaj spertaj reprezentantoj, kiuj scipovas la lingvon Esperanto, estos je dispono. Oni ne bezonus pagi al ni por la ekspozado de la varoj, sed ni petas, ke oni enkalkulu en la prezojn je nia favoro la laŭ branĉreguloj kutimitajn procentojn.

Ĉiuj sendaĵoj, koncerne la Komercan Konferencon kaj la Ekspozicion, estu adresataj al Esperanto-Kongreso (Komerca Konferenco) Wien (Aŭstrujo) sekr.: VI. Mollardgasse n-o 55.

Invito al Praha.

Speciala vagonaro al la XVI-a tra Ĉeĥoslovakio.

La partoprenantoj de la XVI-a kongreso vizitu la belan ĉeĥoslovakian ĉefurbon Praha. La samideanoj de Praha zorgos pri ĉiu vizitanto ĝustatempe anoncinta sian alvenon, montras al li ĉion vidindan en la urbo kaj ĉirkaŭaĵo kaj ĉiel klopodos faciligi kaj agrablighi lian restadon. Se venos sufiĉa nombro da aliĝintoj, estos laŭdezure aranĝataj ekskursoj al aliaj vizitindaj ĉeĥoslovakaj lokoj.

Precipe vojaĝante al la XVI-a uzu la vojon tra Ĉeĥoslovakio. Se en ĝusta tempo aliĝos la necesa nombro, estos ekspedita speciala vagonaro de la ĉeĥoslovakia-germana limo (Podmokly-Bodenbach aŭ Cheb-Eger aŭ el ambaŭ lokoj) aŭ almenaŭ el Praha al Wien. La vojaĝoprezoj kaj pluaj etaloj estos ankoraŭ sciiĝataj.

Skribu baldaŭ pri viaj deziroj al Esperantista Klubo en Praha, Příkopy 1, Edison! Aldonu respondkuponon!

II-a Tutĉeĥoslovaka Esperanto-Kongreso dum Pentekosto en Reichenberg.

La preparoj bone progresas. Konvena kaj impresa programo jam estas fiksita kaj ankaŭ la loĝigdemando solvita. Amasloĝejon por junuloj afable disponigis la Jugendamt. Komence de monato majo estos la invitiloj forsenditaj kaj samtempe detalaj informoj publikigitaj.

Geesperantistoj en Ĉeĥoslovakio! manifestu per multnombra partopreno la potencon de la Esperanto-movado en via lando!

Aliĝu kaj petu informojn de: Esperanto-Kongreso Reichenberg-Liberec.

X-aj Internaciaj Floraj Ludoj.

Devizoj de la verkoj ricevitaj.

(Daŭrigo.)

- 40. Unuafuĝulo. — 41. Pacon sur la tero! — 42. Preĝu kaj laboru. — 43. La filo perdita. — 44. Sydney Carton. — 45. Semu kaj dissemu Esperanton. — 46. Homo havas ankaŭ spiritaĵajn bezonojn. — 47. Mondpaco. — 48. Bonis placuisse maxima laus est. — 49. Muziko sonas: modpasinta kant'. — 50. Se mi vidas birdon flugantan... — 51. Katalunujo. — 52. Tannhäuser. — 53. Procede et semper, Italia, semper! — 54. Muza forgesita. — 55. Obsitne antaŭen! — 56. Regu vin mem, sentinte mian doloron! — 57. Pasero kaj najtingalo. — 58. Amo kaj naturo ĉarmas min. — 59. Stierkadu. — 60. La reĝo. — 61. Por gekatalunoj! — 62. Se vi ŝatas mian versaron, mi manĝos la kolbason. — 63. Mi ŝin amas. — 64. Verda kaj blanka. — 65. Ĝis kiam? — 66. Iru tra la mondo. — 67. Quis fuit primus? — 68. Visions de Catedrals. — 69. Alvenonta poemo. — 70. Urbaj floroj. — 71. El noi de la mare. — 72. Vintra balado. — 73. Noktaj idilioj. — 74. En la mondon venis... — 75. Ridu. — 76. Mi restos fidela. — 77. Etienne. — 78. Eloë. — 79. Donna Liza. — 80. Lia filmo. — 81. La kulpo de Judaso. — 82. La krimulo. — 83. Sonoj. — 84. Viklo. — 85. Apefito. — 86. Hej, hola! — 87.

La moderna Ahasvero

aŭ:

La kunredaktoro de „Esperanto Triumfonta“ lernas motorbicikli.

Kara s-o ĉefredaktoro!

Mi vidis lin! Kun ekstrema mi vidis lin. Pro kio vi ne obeis miajn telegramoj al vi senditajn konsiliojn, ke vi nepre ne permesu al via kunredaktoro fian ekstravagancaĵon, ĉar pro sia korpa koloseco li tute ne taŭgas por motorbiciklo. Kial li ne elektis alian trafikilon por fari sian propagandovojaĝon? Ekzistas ja sufiĉe da ili. Nun la malfeliĉo okazis, kaj mi vidis la kompatindulon. La vidaĵo tiom ekteruris min kaj mian pegason, sur kiun mi ĵus estis supreniginta min, ke ĝi pro ektimego eksaltis kaj freneze rajdis min tra la aero. Mi havis la senton, ke ĝi forportos min ĝis la mondolimoj, ke mi neniam plu atingos la teron sub miaj piedoj. Jen, kio naskiĝis dum mia furiozofreza rajdo:

Pro kio stranga la teruro
Jen en la stratoj kaj forkuro
Timplena? Kial la infanoj
Ludilojn ĵetas el la manoj
Ekĉesigante sian ludon?
Pro kio finas la diskuon
En la gastejo la klientoj
Kaj meĥistoj de l' ĉarpentoj
Saltegas for, kaj ĉiuj homoj
Rifuĝon serĉas en la domoj?
Pro kio sin de l' ĉar' deŝiras
Ĉevaloj aŭ ĝin fugfortiras?
Bovinoj, kaproj, ŝafaj idaj,
Brutaroj kvazaŭ ĉaspellitaj —
Pro kio grandaj per saltadoj
Kuregas ili tra la stratoj?

Ne karnaval' de kisoj. — 88. Infano Ĝojo. — 89. Dolĉe, dolĉe... — 90. Infera kavaliro. — 91. Milda brulo. — 92. Iafane. — 93. Enfalinta mino. — 94. Fajfi kun facilanim'. — Tinti per la farsa rim'. — 95. Printempa torento. — 96. Fundamentaro. — 97. Enterigitaj trezoroj. — 98. Jen la plej bela sorto: Poeto ĝis la morto! — 99. Amimort'. — 100. Kial ne mi? — 101. Ĝemulo iafajo. — 102. Sur la sapoglobo. — 103. Polvereto. — 104. La virgulino kaj la diablo. — 105. La fremdulo. — 106. La ruĝa Beeke. — 107. Kardi iradas tra l' arbar'. — 108. Revo. — 109. La Virgulino kiel kavaliro. — 110. Kvar tradukaĵoj. — 111. Tri originalaĵoj. — 112. La preĝo de l' infanoj penetras tra la nuboj. — 113. Ĝajnu la mondon per gaja ridado. — 114. Feliĉa sonĝo. — 115. Correm-hi tots. — 116. La kverka skio. — 117. Aĵse. — 118. Ave Maria. — 119. Ĉu „gurgo“ aŭ „gorgo“? — 120. Okuloj klaraj, serenaj. — 121. Mensoga amo, sed amo. — 122. Amo, animo de l' mondo. — 123. La kinematografo kaj la geinfanoj. — 124. Katolikismo aŭ Paganismo? — 125. Fantazio. — 126. Per rozoj Aŭror' ilin kronas. — 127. X. — 128. Indulga — sed justa. — 129. Kiel inter la floroj ekzistas helaj kaj malhelaj, bonodoraj kaj senodoraj, belaj kaj nur utilaj, tiel en la Floraj Ludoj apud la Poezio trovi lokon ankaŭ ĝia serioza fratino: la Scienco. — 130. En spirita pilgrimado. — 131. Religio. — 132. Trans la vivo. — 133. Malfruemulo. — 134. Mi amas la birdojn. — 135. Ĉu ni ne venkos en decida hor'? — 136. Placi al ĉiuj neniu sukcesis. — 137. Estimem els ocellis. — 138. Pax vobis. — 139. Non si ama e si defende meno la patria con la forza della lingua che con quella della spada.

Tiuj 139 verkoj alvenis el 15 landoj, jene: Katalunujo (lando kie okazos la Floraj Ludoj) 29, Germanujo 21, Anglujo 12, Hungarujo 12, Aŭstrujo 12, Francujo 11, Svisujo 9, Polujo 8, Italujo 7, Rusujo 6, Danzig 6, Hispanujo 5, Ĉeĥoslovakujo 1, Svedujo 1, Brazilo 1.

La ĵugantaro, kiu aliĝos la 24 premiojn de tiu Literatura Konkurso, konsistas el s-oj: Th. Cart, prezidanto. — Julio Baghy. — Jacinto Bremón. — Jacinto Comella. — Estanislau Pellicer. Jaime Grau Casas, sekretario. —

La verdikto aperos je la fino de majo. La Festo de la Floraj Ludoj okazos en Vich (Katalunujo) la 9 junio, ĉe Vasta teatro, dum la XI-a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio.

Federacio de Esperantistaj societoj en Polujo.

Komuniko.

En la malfavoraj por Esperanto tempoj, kiam la cirkonstancoj por nia agado fariĝas ĉiam pli malfacilaj, — por la bedaŭrinda indiferenteco de l' vasta publiko al nia ideo kaj afero — la estraro de la Federacio de esp. Societoj en Polujo decidis dum e suspendi la agadon ĝis pli favoraj kondiĉoj.

Ĉiuj dokumentoj de la Federacio restas en la manoj de la sekretariino.

Prof. Odo Butwid,
prezidanto de la Federacio, Krakovo.

Dola Instituto de Esperanto

konsideras sia devo komuniki ke pro kaŭzoj de ĝi ne dependantaj ĝi provizore (ĝis revoko!) interrompas sian agadon.

La tuta materialo kaj dokumentaro restas ĉe la gvidanto.

Varsovio, la 18. III. 1924.

Edvardo Wiesenfeld, L. K.
gvidanto de P. I. E. Biela 5, Varsovio.

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciiĝojn (sur postskribo al aparta folieto unufanka skribita, sed ne inter administrat' aŭ privataj sciiĝoj) pri ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

Landoj. Ameriko.

Usono.

Philadelphia. Edward W. Pharop, prez. de la Philadelphia Esp. Societo, faris la unuan paroladon de ĉiuvendreda serio en kiu oni faras preparajn lecionojn kaj poste progresajn lecionojn. Oni eble ankaŭ faros paroladojn per dissendejo WDAR en Philadelphia je onlongeco de 395 m. La daton oni ne scias nuntempe sed estos sufiĉe frue sciiĝota, por ĝin anonci en la ĵurnaloj. Se ĉi aŭskultos la paroladon, estas petata skribi al la ejo por ke oni permesu referon.

Ĝermanio.

Aŭstrio.

Graz. La 4 aprilo finiĝis kurso de s-o Wagner, mag. pharm., kiun ĉesolvig per sukcesa ekzameno 7 de 15 komencintoj.

Ĝermanio. Eggenberg apud Graz. S-o Gottfried Schwarz gvidas kursojn por ĝenerantoj, unu por knaboj kaj alian por knabinoj de la tiea burĝa lernejo. La kursoj komencis meze de decembro kun 40 knaboj kaj 34 knabinoj kaj daŭros ĝis fino de junio. Hodiaŭ partoprenas ankoraŭ 20 kaj 15. En la sama loko instruas s-o Ludw. Pernegg private al kelkaj infanoj. — En la princepiskopa seminario instruas Esp. de oktobro ĝis fino de la lerneja jaro D-o Halbedl. Sukceso kontentiga. — Por la „Teozofia Societo“ en Graz s-o Otto Schönemann aranĝas kursojn pri Esp.

Ĉeĥoslovakio.

Reichenberg. La redakcio de „Reichenberger Zeitung“ ricevis el Melbourne (Aŭstralio) leteron de esperantisto, kiu dankis kaj gratulis pro la regula publikigo de esp. novaĵoj en tiu ĉi gazeto. La redakcio represis la interesan leteron.

— La socialista gazeto „Freigeist“ aperigas nun regule „Esperanto-angulojn“ kun tekstoj el ET. Tiu ĉi sukceso estas la frukto de longdaŭra senĉesa prilaboro. Kontraŭe estas la komunistaj ĵurnalo „Vorwärts“ obstine malfavora por Esperanto. Gelaboristoj instigu la redakcion al pliboniĝo.

Francujo.

Paris. La 7 aprilo s-o D-o Corret, prez. de la Franca Komitato por transoceanaj radiotelefonaj komunikoj, parolis en la Supera Lernejo de Poŝtoj, Telegrafoj kaj Telefonoj en Paris pri la transoceanaj komunikoj. Li parolis ankaŭ pri la neceso de Esperanto kaj donis diversajn informojn pri la lingvo. Tiu parolado estas la unua farita pri Esp. kaj radiotelefono en Francujo.

Propagandaj festoj en Roussillon.

Kvar tagoj antaŭ Pasko, la prezidanto de la Esp. Mediteranea Federacio sciigis la delegitojn, ke la federacia kongreso ne okazos por Pasko en Perpignan. Tamen, la festoj, kiuj jam estis anonciitaj en la loka gazetaro, okazis kun granda sukceso.

Dimanĉo, la 20 aprilo, je 8 h. matene alvenis komitat-delegitoj el Sainte Marie, Rivesaltes, Estagel, Béziers, Aigues-Vives.

Je la 10 h. reprezentis en la ĉambro de l' „Casal Catala“ la aktorero de „Amika Rondo“ antaŭ 150 personoj propagandan komedion „L'Héritage Klodarec“. Muziko, monologoj, kantoj, finis la matenfeston.

Je la 12 h. la delegitoj tagmanĝis en „Hotel de France“, Posttagmeze okazis laborkunveno, kie la delegitoj prenis decidojn por akceli la esp. propagadon.

London, 21 aprilo, je la 7 h. matene la delegitoj kaj ĝemik-rondanoj veturis al Céret, kie ĉe la stacidomo atendis multaj geesperantistoj. Kun flago antaŭ ĉiuj, la geesperantistoj eniris kantonon en Céret.

Altrude la benzindoro
Haladzas tutan la aeron,
Kaj longavice kovras teron
Birdplumoj, vostoj, bestpiedo,
Kadavroj tutaj, sanglangetoj,
Disrompitaĵoj kaj cifonoj,
Kaj paliseraj, splitoj, ŝtonoj!

La inferanon en ĉagreno
La homoj sekvas kun malbeno,
Insultojn grince postmurmuras —
Sed li freneze pluveturas.
Vizaĝo lia deformita,
Rigardo pro terur' rigida.
Timŝvito de la frunto fluas;
Tremego lian korpon skuas.
Starigas la harar' sur kapo —
Forflugis venten ja la ĉapo —
La koron premas mortotimo.
Vestaĵon kovras strata ŝlimo.
Kaj ĉiam pluen tra la stratoj
Zigzage portas lin la radoj.
De temp' al tempo li ekĝemas,
Li ploras, preĝas kaj blasfemas.
Kaj grincmurmuras en kolero:
„Belega estas la afero,
Ĝojigas ege ĉies koron,
Se oni — estras la motoron,
Sed min trompegis la obstino
De la diabla kurmaŝino.
Ho, ke mi estu forrestinta
De l' kreitaĵo malbeninda!
Ke mil diabloj ĝin forprenu
Aŭ bona Di' por helpi venvu,
Ĉar ve, neniel mi plu povas
Malsupreniĝi; mi ne trovas
La haltigilon de l' motoro;
Ne plu ekkaptas la memoro,



Anserojn, kokojn, jen pro kio
Konfuza kaptas dancaĵon?
Pro kio eĉ la vekridaĵoj
De porkidetoj, hundoj, katoj?
Klarigon pri la kuriozo
Konduko kaj tumul' haosa!!
Ha! Jen! Jen kun bruega knaro,
Sur la fantoma, cikla ĉaro
Alproksimiĝas la monstrulo
Kun bril' sovaĝa en okulo.
Jam flugas preter la motoro;

Je la 12 h. okazis la tagmanĝo en la montaro apud belaj fontetoj.

Je la 14 h. oni prezentis en la ĉambrego de „L'Union Cérétane“ antaŭ 600 pers., inter ili la urbestro, la lerneja-inspektoro k. a., la esp. komedion „Tie ĉi oni parolas esperante“, ludata de geesp-istoj el Céret.

S-ano René Liech anisio al la aŭskultantoj ke dum la interakto oni monokolektos por la monumento al Zamenhof; ĝi rezultiis 140 fr.

Poste la Perpig'na „Amika Rondo“ ĉarmis per kantoj, monologoj kaj reprezentado de „L'Héritage Klodarec“. Ni devas danki al s-ino Julia, Céret, kaj al s-oj Talon, Coste, René kaj Jean Liech, Perpig'na, kiuj organizis la festojn.

Ĉiuj ĵurnaloj de la regiono skribis favore pri tiuj festoj, eĉ s-o Emmanuel Brousse, dep. de „Pyrénées Orientales“, kiu tri demandojn pri Esp. respondis per „jes“, Ĉestatis la koncerton.

Kiel oni vidas, la afero marŝas en Roussillon. (René Liech.)

Germanujo.

Bochum. Prop. vespero de la Esp. Grupo okazis en marto. 120 ĉestintoj. Parolinto s-o Sandrock, del. UEA, Essen. Du kursoj kun 88 lernantoj. Gvid. D-o Wullen kaj s-o Zamoth, Bochum. UEA havas ĉi tie 45 membrojn.

Boitrop. Prop. parolado okazigita de la loka Esp. grupo en marto. 160 aŭskultintoj inter ili multaj instruistoj. Parolinto s-o Sandrock, del. de UEA en Essen. Anonciĝis 64 pers. al kurso. Gvid. s-oj Strauch kaj Schwaak el Boitrop.

Chemnitz. La movado revigligis. Novaj kursoj por komencantoj kaj por progresantoj estas aranĝataj. La 15.3. parolis sup. instr. E. Klemm publikke pri „Esp. en kultura kaj ekonomia lumigado“. Generala konsento. La 18-21.4. okazis tie ĉi la 5. Germana Laborista Esp. Kongreso. Ĉestatis 700 membroj. La kapabeo-ekzameno faris 17 laboristoj. Bonega estis la tre bone vizitita (1000 pers.) saluvespero. Informo pri Esp. vivo en Chemnitz estas nun Libroventoje Kastel, Creitgasse.

Essen (Ruhr). Je fino de junio la loka Ekzamena Komitato de la Esp. Instituto por la Germana Respubliko okazigos Esp. ekzamenojn „pri kapabeo“. Ekzamenoj el la Rejn-Vestfalia industrirregiono bonvultu tuj anonci sin ĉe s-o Otto Sandrock, Essen-Ruhr, Kahrsr. 47. Tie ankaŭ estas havebla la ekzamena regularo kontraŭ pago de 20 or-fenigoj.

Hochemmerich. Finiĝis kurso gvidita de s-o Desch el Homberg kaj fondigis grupo. Gvid. s-o Driesen el Mers. Parolado pri UEA de s-o Sandrock, del. en Essen. 10 pers. aliĝis al UEA.

Homberg (N-Rhein). S-o Desch finis kurson kun 14 partoprenintoj. Pri UEA paroladis s-o Sandrock el Essen en la Esp. grupo, el kiu dek personoj membrigis.

Grand-Britujo.

Brighton. Ĉe 5. Konferenco de Sud-Orienta Federacio, okazinta en Brighton la 21 aprilo, oni elektis s-on J. J. Boutwood el Hastings kiel prezidanto de la Federacio, kaj kiel vicprezidantoj urbkonsilanto W. E. Parry el Brighton, fervora kaj sperta esp-isto. La urbestro de Brighton prezidis la publikan kunvenon kaj koncerton, kaj esprimis sian altan ŝaton kaj esinion al nia afero.

Jugoslavio.

Daruvar. Antaŭ kvar jaroj ankoraŭ neniu en Daruvar scias pri Esperanto. Sed per granda ofero komenciĝis kurso, sub gvidado de fervora s-ano J. Dittrich, redaktoro de lokaj gazetoj Jugosl. Ĉeĥoslovaci kaj Daruvarčan. Post fino de kurso ni fondis „Esp. Rondeton“, prez. s-o F. Homolka. Kunvenon ĉiutage 2-3 h. Ni invitis ĉiujn esperantistojn, kiuj vizitos nian urbon viziti ankaŭ nian kunvenon.

Polujo.

Borislav. La 30.5. la loka laborista grupo faris korespondvesperon je kiu partoprenis: germ. 6, aŭstroj 5, francoj, angloj, jugoslavoj, rumanoj, belĝoj, holandoj po 4; ĉeĥoj 5, poloj kaj svedoj po 2, svisoj, italoj kaj hungaroj po 1. Al filatelisto s-ano Juraj Mraz el Jugoslavio pro plej belan poŝtaron, la geesperantoj aliĝis premion, kompletajn de poŝt PK diversurba; al k-o M. Bodet el Belgujo bilditan historion de la liberlaborigista bataloj. — Por memori la vesperon, la geesperantoj decidis, ĉiuj kiuj aliĝantaj partoprenantoj interŝanĝi plej artan bildon de nacia (precipe laborista) pentraĵo, presitan reprodukon ne pli karan ol 10-30 frankoj de PK. Per ĉi tiuj artaĵoj oni intencas ornami propagande salono de „Popoldomo“. Adreso por sendaĵo: s-o Roman Wulczek, Kasa Chorych, Boryslaw, Polujo. — Estonte, oni decidis aranĝi lertvesperon laŭ temo: „Internacia humoro kaj safto“.

Ja kion fari kaj apliki,
Por la kanajlon ekhaltigi.
Ĉar do mi ĝis la tago lasta
Veturos tra la mondo vasta,
Tra urboj, landoj — laŭ inklino
Malica de l' infermaŝino?
Denove li eksperimentas,
Denove li blasfemas, plendas;
Sed kuras la klopodojn spite
Nun la motor' eĉ pli rapide.
Kaj jam en la vilag' proksima
La homoj pro fimeg' senlima
Forkuras

Jen, vidante la rekiĝon de la samaj teruraj kaj sangaj scenoj, mia pegaso per malespera flugilo-batis faris furiozan flankensaladon. Mi estis ĵemata de sur ĝia dorso, falegis kaj falegis, kaj jam mi kuŝis en la strata koto. Ĉiuj membroj dolorigis pro la maldolĉa alfrapigo, en mia kapo ankoraŭ turniĝis la viditaj teruroplenaĵoj bildoj. „Ve, ve“, mi murmuris, „ho, la kompatinda kunredaktoro! Tie li ruliĝas tra la mondo, ruliĝas kaj ruliĝas. Por eterne! Kaj la stratoj prisemiĝas per liaj haosaj postsignoj, kaj la aero resonigas la vekriadojn de l' kompatindaj viktimoj. Jam tra la tuta mondo kuradas lia famo, kaj baldaŭ dum la longaj vintrovesperoj patrinaj rakontoj al siaj infanoj pri la montra, fantomeca, eterna biciklisto. Ho, por eterne! Tia inteligenta viro, tia multpromesanta samideano, tia laborema redaktoro, kaj nun tia fino! De kie vi nun prenos novan?“

Jen mi sentis varman spiron en mia vizaĝo, kaj io malglata lekis mian manon.

„Ha, estas vi, mia fidela pegaso! Sed en kia stato? Viaj flugiloj ja estas disrompitaj, la kolbaroj forŝiritaj, kaj kiel kompatinde vi lamas! Cu

Lódz. La 23.2. okazis grandioza „raŭto“ aranĝita de la esp. societo „Laboro“, kiun ĉestis pli ol 400 pers. La 27.2. la sama societo aranĝis en la salono de muzik-amantoj presperantan paroladon de s-o Zimmermann en germana lingvo. Konsiderante la grandan sukceson oni ripetis ĝin la 14.5. en la plej granda halo de Lódz „filharmonio“ antaŭ 1000 aŭskultantoj. Interesa diskuto sekvis, kiu kaŭzis la akcepton de Esperanto en lernejoj. Post la parolado estis bela koncerto en Esperanto, majstre aranĝita kaj plenumita de la operaj kantistoj s-ino Julio Karesmar kaj s-o Juliano Kerger.

Kurson en Esp. partoprenas 18 personoj, gvidataj de s-ano I. Lejzerowicz, en la societo „Laboro“. Oni disdonadis en la stratoj de Lódz 2000 ekz. de flugfolio.

Portugallujo.

Lisboa. La 6 januaro okazis en ĝia sidejo, Rua de FÉ 25-19, ĉe Gremio Beirao, la inaŭguro de „Esperantista Rondo Amikeco“. Parolis s-o Francisco Silva, kiu prezidis la kunvenon, s-o S. Carrara, del. de UEA, pola esperantisto s-o Hohejer kaj aŭstra samideano s-o Ignaz Winkler. Fine oni iostis je la revigligo de esperanta movado en Lisboa kaj je la prospero de la societo.

Ĉe la Industria Lernejo Fonseca Benvides funkcias kurso sub gvidado de s-ano José Ramalho.

Grava venko de Esp. en Lisboa.

Post preskaŭ du jaroj, malhelpita de la civila urbestro, Esperanto fine venkis.

Ni povas diri, sen trograndigi nian entuziasmon, ke vera apoteozo estis la festo de reinaŭguro de „Esperanta Portugala Polica Societo“ kaj la malfermo de polica kurso en 1924. La ĝenerala komandanto de la Polico, subkolonelo s-o Ferreira do Amaral, kiera kaj inteligenta viro, opinias, ke Esperanto ankaŭ povos helpi al polico kaj pro tio li apogas la Instruadon de Esperanto en la korporacio. Li mem volis prezidi la festojn kaj esperantan ekspozicion, atente legante dokumentojn kaj demandante pri la disvolvado de la esperanta movado eksterlande.

La inaŭguro okazis la 13 januaro. La salonoj de la polica lernejo, kiu estas longa je sep fenestroj, estis lukse ornamataj per silkaĵoj, portugalaĵoj kaj flugoj kaj plantoj. La nuna prezidanto de la Polica Societo, la policoestro Almeida, per multaj vortoj, diris la celon de la kunveno, esprimante la dankemon de la societo por la ĉesto de lia moŝto s-o Ferreira do Amaral kaj invitante lin prezidi la feston.

Siavice lia moŝto invitis s-on Saldanha Carreira kaj s-o Winkler, aŭstria esperantisto, ĉestanta la kunvenon kiel sekretarioj. La profesoro de la polico, Saldanha Carreira paroladis dum tri horokvaronoj pri la patrujo kaj aspektoj de Esperanto kaj ĝia utileco en la internaciaj rilatoj.

Eldiris poste „La Vojo“ policoestro Ribeiro, kaj la subpolicoisto Alves montris per la diro de la poemo „La korvo kaj la vulpo“, la belecon kaj belsonecon de nia lingvo. Ankaŭ Alves, paroladis laŭdante la lingvon kaj fine malfermante la kunvenon. Lia moŝto la komandanto parolis pri la taŭgeco de la ideo, lerte argumentante kaj promesante helpi en Esperanto, kiel ekster ĝi, la instruadon de la polica Korporacio.

Per gramofonaparato oni aŭdigis nian esp. himnon kaj la voĉojn de s-o Gabriel Chavet kaj s-ino E. Cense. La kurso funkcias, gvidata de Saldanha Carreira kun du-dek lernantoj. A. Costa, Lisboa.

Rusujo.

Novonikolaevsk (Siberio). Malfermiĝis kursoj. En tri grupoj lernas 90 geknaboj, instruas del. de UEA F.P. Viŝnjakov kaj membro de UEA D.M. Mojarov.

Astrahani. 10 marto. Subpoliprosvet (regna kulturkleriga oficejo) fariĝis protektanto de Astrahana Societo esperantista!

15 marto. En la Akvkonduko eklaboris deka esp. rondeto. Gvidas Bazilo Avenir.

11 marto. En loka rusa gazeto „komunisto“ aperis artikolo „Esperanto disvastigita“ traktata pri esperantista movado en astrahana regiono.

22 marto. Ankaŭ aperis artikolo „Esperanto en vilaĝo.“ 22 marto. Esp. rondeto de la klubo „Agit-Punkt“ transiĝis en klubo de „zavodo kamvo“ kaj tie ĉi organizas esp. kurson.

28 marto. En loka rusa gazeto „komunisto“ aperis artikolo „interkorespondado kun eksterlandaj esperantistoj.“

31 marto Ankaŭ aperis presperanta artikolo „Moskva donas radio-koncertojn.“ La artikolo notas pri esp. radio-koncerto. B. A.

Fakoj.

Esperanto en hotelfaka lernejo.

La ĉefkunveno de la „Reichsverband deutscher Gastwirte, Genossenschaftsverbände in der tschechoslovakischen Republik“, kiu okazis je 19 kaj 20 marto 1924 en Troppau (Silezio), decidis pri instalado de hotelfaka lernejo en Karlsbad 1924. Sekvanta instruprogramo estis akceptata:

Devigaj fakoj: germana, ĉeĥoslovaka, franca kaj angla lingvoj, gastmetia librotrenado, negoca korespondado, komerca kalkulado, naturscienco, fiziko, kemio kaj maŝinkonstruo, instruo pri nutr-ajoj kaj stimuloj, praktikaj ekzercoj en laborejo, instruo pri ekado kaj kurejmastrumo, kemio de la trinkaĵoj, komerca kaj trafika geografo, historio, komerca kaj kambia informo, politeknika kaj politika ekonomio, konstruo kaj instalado de hoteloj kaj organizo, instruo pri metia funkcio, higieno, instruo pri servado, maŝinskribo, reklamo kaj asekujo, korpokulturo.

Novdevigaj fakoj: itala, hispana kaj esperanta lingvoj kaj stenografio. Ferdinand Kaulfers.

Radiosfero.

Tokio (Japanujo), 6 aprilo. Je la 8,15 h. atm. estis aŭdata esperanta radio-programo de stacio WOR ĉe Newark proksima al New York, dissendata je la 8,15 h. pm. sabato, 5 aprilo. La paroladanto estis bonkonata esperantisto s-o James Morton, videl. de UEA ĉe New York.

Esperantistaj filatelistoj!

Dum la XVI-a Esp. Kongreso en Vien ankaŭ okazos kunveno por la tutmonda filatelistaro esperantista, kaj la aranĝantoj invitas jam nun ĉiun filateliston al tiu kunveno. Ni okazigos ankaŭ ekskursojn al filatelistaj rondoj kaj intersanĝ-vesperojn. Ĉiu intereso estas petata sin turni al la ĉefaranganto, sinjoro Josef Kolhofer, Wien XIII, Zehetnergasse 37.

Universala esperanta pacifista ligo.

Al esperantistoj kiuj volas la universalan pacon. — Oni petas, aliĝu al la Pacifista Fak-kunsido, XVI-a U. E. K., Wien! Estas bone skribi hodiaŭ!

Kelkaj sekretarioj de naciaj sekcioj jam sendis raportojn al mi pri laboro farita. La aliaj, bonevole sendu resumojn pli baldaŭ, antaŭ ol aprilo la 15-a. Iu estus pli bone ol nenio!

Kompreneble, nia ĉefa tasko estas propagandi Esperanton inter la pacifistoj, tutmonde, kaj starigi laborantajn naciajn sekciojn de esperantistaj pacifistoj por praktike efektiviĝi la celon. Estas espero ke kopioj de flugfolio kiel propagandilo alvenos al ĉiu sekcio dum la unua semajno, aprilo.

Antaŭen ni ĉiuj al pli fidela laboro! — rememorante la vortojn de Zamenhof: —

Eĉ guto malgranda, konstante frapante
Traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino, kaj la pacienca —
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo, post paŝo, post longa laboro,
Atingas la celon en gloro.

Mary Riley, Internacia Sekretario,
The School House, Clifton-cum-Norwood,
Bristolwith, Harrogate, Yorkshire, Anglando.

ne, ankaŭ vi falegis, por feruro, mi komprenas. Venu, helpu min levigi!“
Per la bridoj mi suprentiris min, ĉirkaŭprenis la kolon de mia sindona kamarado kaj eksingulte ni ambaŭ larmiris hejmen.
Niajn larminojn ni unuigas kun la viaj.

Via malĝojega
Kristiano Mallerta.

Paralelo

inter la Tekniko de Ameriko kaj tiu de Eŭropo.

Originale de Jozefo Major, Budapeŝto.

Oni nur malmulton konas pri la amerikaj cirkonstancoj en Eŭropo kaj transe oni eĉ ne tiom de Eŭropo. Depost ke la devizo de la Taylor-sistemo konkeris la mondon, oni kredas eĉ en teknikaj rondoj, ke la tutmonda industrio laboras nun laŭ la samaj principoj.

La direkto de nia teknika evoluo estas sendube la normigo. Ĉiu lando havas sian normokomision, eĉ internaciaj normo-konferencoj okazas. Tamen oni ne sukcesas enkonduki internaciajn normojn. Plej bona ekzemplo estas, ke oni ĝis nun eĉ ne sukcesis enkonduki la internacian decimalan ŝraŭbosistemon. La konkurenco de kelkaj firmaoj kaj la potenco de la kutimo ne lasas venkon de raciaj formoj. Tamen la normo-laboro progresas. La labor-sfero de la konstruata inĝenierio estas ĉiam pli kaj pli malgrandigata. Hodiaŭ li ne plu povas projekti laŭplaĉan pivoton, li devas elekti unu el la „normalaj“ diametroj. Dum la eŭropanoj pretendas normigi la maŝinpartojn, la amerikanoj normigas la labormanieron. En tio bazigas la grandiozece de ilia industrio. Ili ne

multe atentis la teorion, sed antaŭ ĉio la praktikon. Bona ekzemplo estas tiu kun la turbino. Ĝi estis eŭropa eltrovaĵo, pro teoriaj malfacilaĵoj ĝi ne povis evoluigi. En Ameriko oni tuj komencis eksperimenti kun la plej variaĵ specoj de padoj, kaj la plej bona efekto estis poste konstruata.

Mia interesa okazo estas la sekvanta. La klasika maŝinkonstruado ĉe ni instruis ĉiam, ke oni ne apliku puljojn tro rapide rotaciantajn, ĉar ĉe la rapida rotacia movo la centrifuga forto tre domaĝas al la rimeno, sekve al la tuta rimeno-transmisio. La amerikanoj tamen konstruis tre rapide rotaciantajn puljojn, kies rimeno estis tre longa kaj ege larĝa. Rimenoj ofte atingis la larĝecon de tri metroj. La praktiko do ree demonstris ĵus la kontraŭon de la teorio. Poste oni ankaŭ eĉ ni rekonis la praktikecon de la amerikanoj, pruvis ĝin teorie kaj en niaj terfandejoj jam rotacias similaj puljoj

Kaj ĉe la lokomotivo? La klasika mekaniko instruas; oni konstruu la kaldronon kiel eble plej sube, por ke la lokomotivo estu kiel eble plej stabila. Sed en Ameriko oni deziris atingi kolosan rapidecon. Sekve ili bezonis tre grandajn radojn. Ili provis kaj ili sukcesis. Ankaŭ eĉ ni oni jam imitas la alte kuŝantajn lokomotivkaldronojn kaj oni eĉ rimarkas pli bonajn nombrojn je vojturniĝaj centrifugoj kaj ankaŭ ĉe la konsumiĝo de la reloj.

Dume la tekniko bezonas internaciajn normojn. La amerikanoj grandstile laboras, dum ke la eŭropanoj konferencas. Kiam oni sukcesos atingi kompromison, oni eĉ ne povas konjekti. Ŝajnas ke la lingvaj malfacilaĵoj ankaŭ sur tiu ĉi teritorio malhelpas. En epoko de la „civilizacio“ la menso de la teknikisto estas fakte tro multekosta por la filologio.

Bibliografio.

Libroj.

Woher? Ableitendes Wörterbuch der deutschen Sprache (Etimologia vortaro de la lingvo germana). De D-o E. Wasserzieher. Bind. 5 mk. Ferd. Dümmler, Verlagsbuchhandlung, Berlin SW 68.

Preĉpe kreaĵo por la germanoj, tiu ĉi etimologia vortaro estas konsilanto en ĉiuj demandoj de la lingva deveno, vere fundamenta, kompetenta laboro, bonega, fidinda gvidanto. Do per sia signifo ĝi etendiĝas trans la germanaj limoj.

Ĉiu negermano, konante la germanan lingvon, trovas en tiu ĉi verko insignon kaj klarigon ne nur en vorhistorio, sed ankaŭ en kultura kaj homara historio. La detalaj vortoj sekvas laŭalfabete. Estas cititaj unue la algermana, poste la mezaltgermana, malnovaaltgermana, gotika formoj kaj konforme al la graveco de la vorto la aliaj lingvoj. La anglia lingvo tiu ĉi estas preĉpe konsiderita, sed ankaŭ la malnovnorvega, dana, sveda kaj nederlanda lingvoj estas cititaj. Por tio preĉpe al ĉiu germana esperantisto ĉi tiu libro faros bonajn servojn, nome por esperantologiaj studoj, kvazaŭ kompletaj al la Zamenhofa Fundamento. Oni povas deziri, ke ĉi tiu fervora laboraĵo estu posedata de ĉiuj esperantistoj.

„Melodioj de l' Nokto“ de Juliusz Kriss, Kraków 1924. 30-paĝa.

En dekkvar poemoj, kiuj ne ĉiuj estas „Melodioj de l' nokto“, kaj kelkaj tradukoj la aŭtoro donas al ni provojn de sia poezia povoco. Lia koro profunde sentas, liaj okuloj rigardas en la abismojn de l' homa vivo, en la kaŝitajn belecojn de l' naturo. Lia orelo aŭskultas la plej sekretajn movojn de l' homa animo. Ne malpli bona estas lia serĉado. Sed ĉiam la versoj estas korektaj. Sendube oni povas deziri al la versisto pluan frukteman laboron — senzorge pri la pli afiaj apostrofoj! —, tiam ni havos poeton pli en esperantujo.

„La morto de la delegito de UEA“ de Nikolao Hohlov. Originala komedio el la vivo de esperantistoj. 1924. Pr. broŝ. 0,40 sv. fk.

Nikolao Hohlov donacas al ni komedion, kiun ne nur estas inda por esti legata, sed ankaŭ por esti prezentata. Ĝi estas pli valora per tio, ke la societanoj de Zagreba Esperanto Socio intencas, ĝin dramigi okaze de la XVI-a en Vien. La vizitontoj de l' kongreso ĝojos pri la prezentado. La enhavo estu skizata jene: Inĝeniero Aleksandro Koaks, del. de UEA, iom tro esploris ĝi fundon de l' glaso, festentinte sian dudekjaran esperantistan jubileon en la kunsido de komitato de la loka Esperanto Socio kaj estas alportita hejmen kvazaŭ mortinto. Lia fide'la servisto Filipo metas la „kadavron“ sur la kanapon, la kadavron de la pseŭdomortinto, kiu nun lasas preteriri tragikomediajn Teruro, funebro, doloro de la edzino kaj servistaro. Ekstera komato, etiketa kondolencviziitoj de la anoj, kiuj provadas kaŝi sian personajn interesojn sub la ŝirmilo de Esperanto, same ankaŭ la subdelegito Bennol sian sekretan inklinon al la edzino de Koaks. En la persono de l' negra samideano Hiu-ĉi-ĉi-ĉi-ĉi-ĉi-ĉi, kiu unue serĉe farigas viktimo de intermiksio, la tre komika komedio estas agrable solvita.

Ĝi taŭgas por esti prezentata okaze de grupofestoj, se oni deziras ridi tuktore, kaj ne postulas tro multe da lerico de la agantaj personoj. Por la verketo komenciĝas la biblioteko de la „Konkordio“, eldonita de la Sudaŭslava Esperanto Servo en Zagreb.

Bona komenco daŭriginda! Hans Dahmen, Horrem.

Alvoko por kunlaborado.

Kiel kunlaboranto de granda hungara semajna gazeto por teatro, kino, sporto kaj radio, mi ricevis specialan taskon: redakti la eksterlandan anglon. Pro propagando, mi volas tion fari, nature, per Esperanto. Do mi petas la ĉiuland dan samideanaron por konstanta kunlaborado al tiu gazeto per originalaj artikoloj, sciigoj el la teatra, kinematografia, sporta kaj radia vivo (la originalaĵoj aperas sub la nomo de la verkinto), per alsendo de tiuspecaj fotografajoj kaj nacilingvaj bildogazetoj (kun esperanflingva klarigo de la bildo-subskribo).

Al konstantaj kunlaborantoj mi sendigos regule la gazeton kaj ili estos ankaŭ alimaniere rekompencataj.

Mi volas ankoraŭ rimarkigi, ke la gazeto estas tre disvastigita en Hungario kaj la najbaraj ŝtatoj, do ĝin ekĝajni por nia movado estas tre valora.

Skribu por detaloj, sendu artikolojn, sciigojn, fotojn al s-o Endre Hevesi, Budapeŝt, Teréz-körút 50.

Esperanto por blinduloj.

Ĉiujn institutojn por blinduloj, kiuj jam enkondukis Esp. en la instru-p anon, mi petas tre kore respondi demandoj sekvaltaj: 1. nomo de la instituto, 2. kiom da blinduloj partoprenas la Esp. instruon, 3. komenco de la Esp. instruo en la koncerna instituto. La alfero tre urĝas, ĉar mi bezonas materialon por starigi liston de ĉiuj eŭropaj kaj ekster-eŭropaj blindul-institutoj, kiuj jam enkondukis Esp. (devige aŭ ne). La liston mi devas sendi al la registaro, kiu emas devige enkonduki Esp. en blindul-institutoj. Simpla poŝtkarto sufiĉas por la respondo. Respondojn plej baldaŭ. Lingva: Koran dankon antaŭe por via helo. Jen vere bona kaj praktika okazo por propagando. Adreso: Głowczyński, blindul-instruito, Bydgoszcz, Polujo, Zakład dla Ociemniałych, Krasniewskiego n-o 2.

Gesamsideanoj kolektantoj!

Se vi volas havi findand intersaĝo-kunulojn, abonnu la „Jara aperanta gazeton

„TURUL“

kiu estas la oficiala organo de la internacia korespondado kaj intersaĝo-centro

„HUNGARIA“.

La duono de abonantoj estas esperantistoj! - Ĉiu teksto en „Turul“ estas ankaŭ tradukata esperanflingve. - Jara kotizato: 1 dolaro, 3 ŝilingoj, 4 svisaj frankoj, 10 francaj frankoj, 2 lenoj ktp. - Priu prospektin de la direktoro

s-ino Julio Lukács,

---VII Nefelejts u. 32 --- BUDAPEST --- Hungario, ---

Mondkonataj Mittenwalder Muzikinstrumentoj. Serĉu ĉie agentojn!

Vendistoj kaj komercistoj de muzikinstrumentoj!

Malmultekoste vendas la eksportfirmo A. J. Hornsteiner en Mittenwald en Bavario permanfariatajn instrumentojn:

Table with 2 columns: Instrument type and Price. Includes Pli bonaj violonoj, Hornsteiner Soloviolonoj, Ĉitroj, Liuto, Gitaro, Violonĉelo, and Violonarĉo.

Sendkostoj estas speciale kalkulataj!

Mendojn kaj demandojn direktu nur al la reprezentanto:

F. X. Hofmann, Karl-Singerstr. 10, München 39, Germ. Prezaro laŭ deziro.

Se vi bezonas Esperantaĵojn

postulu la riĉenhavan katalogon de: niaj multe ŝatataj eldonaĵoj! :-:

(Lerno- kaj ekzerco-libroj, vortaroj, literaturaj verkoj ĉiusecaj, insignoj, propagandaj ktp.)

Abonu nian gazeton Germana Esperantisto!

Li plej malnova el ĉiuj ekz. Esp.-gazetoj.

Ni liveras akurate kaj al ĉiuj landoj.

Esperanto-Verlag Eilersiek & Borel G.m. Berlin SW 61, Wilmstrasse 5 (Germanaĵoj)

Advertisement for 'Membro en pli ol 40 landoj' featuring a circular logo with 'Esperantista - Internacia - Interlingva' and 'Amikeco' text.

Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morio, okazonta gravaj esp. kunvenoj, festoj k.s.) s-o n-paĝe. Aliaj anoncetoj, nur akceptitaj por minimume du sinsekvajj enpresoj, kostas po du enpresoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Abonantoj, ĉe kiuj ni povas depremi la pagon de la abonkonto, ĝuas por propra anoncetoj preferan prezon de kvin ET-numeroj. Germanojn pagas 2.- mk., prefera prezo por postabonantoj 1,28 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

90-JARA NASKIĜTAGO. La patrino de nia s-eno Ferd. Kaulfers en Franzendorf, Ĉes., festis la 18 aprilo 1924 la 90-an datrevenon de sia naskiĝtago.

MAJA COLLIN PESTO. La nunjara, jam fame konata, okazos dimanĉo la 18 majo. Labora kunsido je la 10 h. Komuna tagmanĝo, plezur kuneŝto je la 2 n. Vin atendas belega migrado, alparoladoj, muziko, teatraĵo ktp. Kore invitas la Esp. Socio. Oschatz (Germ.)

LA GERMANA ESP. ASOCIO, loka unuigo Dresden arangos dimanĉon, la 11 majo je la kvina grandstilan printemp-feston en la salonego de Vereinshaus, Zinzen-dorferstr. kaj kore invitas ankaŭ ne Dresdenajn gesam-ideoanojn al vizito. La tuto konsistas el ludoj, kantoj kaj dancoj de esp. lerminoj, de koncerta parto kaj de propaganda teatraĵo, speciale por la festo verkita de la Dresdena s-ano Wehly. Balto sekvas la prezentadojn.

GEESPERANTISTOJ, ATENTU! Mi arangas murbildan internacian ekspozicion kaj vin petas, tiu sendi al mi la diversspecajn murbildojn, kiuj havas pli grandan disvastigon inter viaj popoloj, kiuj estas kun instrua praktika senco por pli multe da homoj. Karikaturoj, simbolojaj ktp. mi ankaŭ deziras. La tekston oni traduku esperante. Al la sendinto de ĉiu bildo mi danke respondos kaj sendos bulgaran originalan egalvaloran 10 bildojn mi premios po 200 levojn (al la sendinto). Adreso D. Popov, artisto, str. Venelin 24, Sofia, Bulgario.

Mi VENDAS esp. gazeton ET n-oj 1-188, UEA-gazeton „Esperanto“ jarkolektoj 1920, 1921, 1922, 1923 (kompl.), Germ. Esperantisto jarkol. 1920-23, Esp. Praktiko jarkol. 1920-25. Koncerne la prezon faru proponojn. S-o Prof. J. Süßler, del de UEA, Saaz, Ĉeĥos.

GEOGRAFOJ! KOLEKTANTOJ! Flagetoj 5x7 cm, sur silko, de ĉiuj landoj, provincoj kaj plej grandaj urboj (ĉ. 200). Prezo 115 sv. fk. Lewandowski, Raĥozj 5, Lwow, Polujo.

KOLEKTANTOJ de PK, PM, L ktp. eniru en „Union Souvenir Card Exchange“ (en Ameriko)! Plej granda intersaĝo-unuigo! Informoj per Gerhard Singe, Gartenstr. 5, Sagan i. Schl., Germ.

ADRESSANĜO. S-o D-o Andreo Fischer, antaŭe en Tiflis, Georgio, nun estas en Leningrad, Malaja Konuŝennaja 5, Rusujo.

BONKOROJ rusaj kaj ĉeĥoslovakaj samideanoj sciigu min pri la sorto renkontinta mian fraton Paul Zurauskas (Juravski) servinta en ĉeĥoslovakia armeo. En 1921 li estis militkapitula de bolŝevikoj kaj enkarcerigita en Omsk-a „dom lisenja svobody“, Siberio. Pluajn sciigojn mi ne havas. S-o Leono Zurauskas, Ezenai, Litovio.

ĈIU ESTOS REKOMPENCATA! Por helpi arangit esp. ekspozicion, do por plifaciligi la malfacilan agadon por Esperanto en tiu ĉi unulingva landejo, mi petas la samideanojn el tuta mondo, sendi al mi po unu il PK, preferu montranta nacian kostumon (bfl.), se eble algiu la necesan valoron en diversaj poŝtmarkoj. Kiel korespondanto sufiĉas saluto kaj preciza adreso. Mi tiu respondos al ĉiu. S-o Rudolf Goldner, del. de UEA, 1510-98 ave. W. New Duluth (Minn.), U. S. A.

ANGLA FAMILIO bezonas fraŭlinon kapablan bone kuir kaj ĉambrojn purigi. Adreso: E. F. Forty, Greybole, Hatfield, Anglujo.

PROPAGAND-PAROLADO kun ekspozicio de Esperanto-presajoj. La 15 majo en loka klubo „Aktivinas“ okazos propaganda parolado: „L. Zamenhof, solvinto de problemoj de lingvo internacia, kaj lia verko Esperanto“. Por pli granda sukceso ni petas ĉiujn bonvolajn samideanojn kaj redaktorojn de esp. gazetoj sendi esp. gazeton, revuojn, afiŝojn, propagandfoliojn kaj il PK. Estas dezirinda nacilingvaj gazetoj kun poresperantaj artikoloj. Valoraĵ specoj laŭ deziro estas resendataj. Sendinto de plej riĉenhava sendaĵo ricevos premion: bildon de fama litova pentristo Zmuidzinavičius „Vizio“ en belega kadro. Ni respondos al ĉiuj sendintoj. Adreso: s-o Leono Zurauskas, Ezenai, Litovio.

LONGDAŬRA MALSANECO de mia patrino kaŭzis grandajn ŝuldojn. Al ĉiu subtenanto mi sendos laŭdeziro komponaĵon manskribitan. Fritz Krämer, Annaberg (Sa.), Germ.

ESPERANTO TRIUMFONTA KOLEKTO vendebila n-oj 1-185 (1920-1924) sen n-oj 5, 4, 5, 25, 75 kaj 80. Prezproponoj petataj B. Ketterling, Elbing, Germ.

SUD-AMERIKANOJ! Helpu pruvi la helpemon de la gesamideanoj! Penadu serioze per oficon en banko, komercfirmao aŭ simila entrepreno por korespondisto, leria kaj sperta, 20-jara, scipovanta lingvanoj germana, esperanta, anglan, francan, italan, hispanan kaj portugalan. Ĉiuj elspezoj estas repagataj. Mi konfidegas vian pretecon! Skribu al Lehrer Krämer, UEA 21584, Annaberg, Sa., Germ.

21 JARA KOMERCISTO kun 1 jara bankpraktiko serĉas okupadon en komercu aŭ industrio en eksterlando. Mi konas Esperanto, anglan, francan kaj hispanan lingvojn; ankaŭ librotendadon, korespondadon kaj maŝinkribadon. Ofertojn al s-o Peter Andresen, Katharinenstr. 7, Flensburg, Germanujo.

Korespondoj Interŝaĝo.

Fraŭlo Borŝo Slavko, gimnazisto, Darnavar Jugoslavio, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per il PK, PM. S-o Rud. Scholz, Königstr. 9., Düsseldorf (Rheinl.), Germanujo, deziras korespondadi per il PK kun ĉiuj landoj. Responduj tu!

FILATELISTOJ! Por 5 sv. fk. aŭ egalvaloro mi sendas 60-70 diversajn hungarajn PM. Mi intersaĝas il PK, PM kaj papermonon. Adreso: Jozefo Toth, Tolna, megye u. p. Pincehelyi Martinka puzta, Hungarujo.

Por propagandaj celoj mi bezonas esperante skribitajn il PK el ĉiuj landoj. Mi petas ĉiulandajn samideanojn skribi al mi je adreso: Stanislaw Folman, Panska n-o 15-a, m. 5., Warszawa, Polujo.

Membroj de esperantista grupo deziras korespondi kun eksterlandaj samideanoj. Korespondantojn oni sendu al sekretario: A. D. Borisoglebskiĵ, Bolŝaja 76, Blagovjeŝensk, Siberio, Rusujo.

Libristoj! Mi serĉas korespondon kun fakuloj en landoj: angla, belga kaj franca. Włodzimierz Pfeiffer, Księgarnia Fiszerska, Łódź, Polujo.

S-o Antonio Luiz da Costa, Rua do Carriao 22, Lisboa, Portugalujo, deziras korespondi nur kun gesamideanoj anglaj, francaj, svisaj, hispanaj, persaj, japanaj kaj el aliaj ekster-eŭropaj landoj, L. PK, QI, EP.

Du amikoj A. C. Canning kaj J. B. C. de Koster, W. de Wihstraat 55, den Haag, Nederlando, deziras korespondi kaj ŝanĝi sportofotografiojn.

S-o Czeslaw Swazrgak, Kielce, gimn. Reja, Polujo, deziras korespondi kaj intersaĝi PM kun ĉiuj landoj.

S-o Arthur Söder, Malfors, Svedujo, deziras korespondi per il PK kaj L kun gesamideanoj de la tuta mondo. Intersaĝas ankaŭ esp. gazetojn.

S-o Arthur Holm, Malfors, Svedujo, deziras korespondi per il PK kaj L kun la tuta mondo.

Atentu samideanoj! La membroj de la Grupo Esperantista de Atvidaberg deziras korespondi kun esperantistoj el ĉiuj landoj. Letervespero estos arangata la 15 majo. Bonvolu sendi L kaj PK il. sub adreso Erik Ahl, Adelsnäsavägen 5, Atvidaberg, Svedujo.

Mi deziras korespondi lere kun beleta, gaja, nigra-hara kaj muzikamenta fraŭlino (18-23 jara), certe vizitonta la Deksesan en Vien. Adreso: Oberpostsekretär Willy Grimm, Beuthen (Oberschl.), Germ.

S-o Eugen Dadajev, Vilmsi ĉi n-o 45, kr. 4, Tallinn, Est., deziras korespondi per il PK kaj intersaĝi PM kun ĉiuj landoj. Ĉiam respondos.

S-o Harald Eigo, Vabriku ĉi n-o 1-6, Jõhvi, Estonio, deziras intersaĝi PM kun ĉiuj landoj.

S-o Teodoro Bakalo, studento de medicino, Sipskinskaja 24, Taŝkent, Turkestano, Azio, Rusujo, deziras korespondi kun la tuta mondo.

S-o Mikaelo Kleverov, str. Petropavlovskaja n-o 8, ĉi. 18, Leningrad, Rusujo, korespondas kun ĉiuj ĉi (per il PK), preferas orientulojn kaj malproksimulojn el Oceanio kaj aliaj malproksimaj landoj; ĉiam respondos.

S-o Antonio Krasauskas, tajloro, Rokikiŝi, V. Aikste 27, Litovio, sendos 50 diversajn, bonkvalitajn PM litovajn kontraŭ diverssezonaĵ, nedifektajn modjurnalojn. Mi ĉiam respondos al ĉiu.

S-o Jakeo Sugimoto, str. Doŝiŝa Univerŝiata, Kioto, Japanujo, deziras korespondadi kun ĉiuj landoj.

La anoj de la grupo Wien de „Elka“, Wien 65, fako 21, serĉas tutmondan korespondadon per L, il PK bfl., PM. La grupo respondos certe al ĉiuj alsendoj.

El Paris, Budapeŝt, Praha kaj aliaj lokoj deziras respondantojn (preĉpe sportistoj kaj ĵurnalistoj) Jerzy Rosenthal, Marszałkowska 96 m. 5., Warszawa, Polujo. Li intersaĝas il PK kaj sporigazetojn.

Internacia intersaĝo-rondo, Kaisersstr. 56, Wien 7, Kafeloj Meller, serĉas tutmondan PM intersaĝon laŭ katalogoj por siaj anoj. Responduj certe kaj ĉiam.

F-ino Cläre Booch, Schanzenstr. 23, Dresden-N., Germ., deziras korespondadon kun la tutmondo per il PK kaj L, preĉpe samideanoj, kiuj partoprenas la Deksesan en Vien.

S-o Alpo Suomalainen, instruisto, Konnitsa, Finlando, deziras korespondi kun la tuta mondo pri abstinencia movado kaj pri legoj per kiuj oni prosperigas la aferon.

S-o Rich. Horatlik, Kumžak 148, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi kun gesamideanoj de la tuta mondo pri diversaj temoj. Ankati intersaĝas PM. Ĉiam respondos.